Mediteraneo

Mediteraneo estas maro inter Eŭropo, Azio kaj Afriko. Antikve la romianoj nomis ĝin la “ter-meza” maro (la latina signifo de “mediteranea”) aŭ Mare Nostrum (“Maro Nia”), dum la helenoj nomis ĝin la “Interna Maro”. Ĝi nomiĝas ankaŭ “Blanka Maro”. Ĝi sterniĝas sur 2 966 000 km^2, kaj ĝia plej granda profundo estas 5120 metroj (apud la peloponeza duoninsulo).

Ekde 1869, la Sueza Kanalo interkonektas Mediteraneon kun la Ruĝa Maro. En la okcidento, la ĝibraltara markolo konektas ĝin kun Atlantiko.

Tutĉirkaŭ tiu maro regas iom simila klimato (mildaj kun pluvegaj vintroj kaj varmaj kaj sekaj someroj), kaj propraj kaj apartaj faŭno, flaŭro, kaj tipaj pejzaĝoj, kies limo (ĉefe ties norda limo) estas ofte nete difinebla.

Ĉirkaŭ ĝi aperis civilizoj (egipta, hebrea, helena, romia, kristana, islamo, renesanco) kiuj influis la tutan mondon. Tiel oni ofte parolas pri la mediteraneaj regionoj.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Mediteraneo